DIA REGNO
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 2 (953) • 2022 •

# Katedralo de Sankta Sofia en Kievo —

## Ĉu en danĝero?

Vidu paĝon 37 pri la katedralo.



Fotis: Paweł "pbm" Szubert / Vikipedio, CC-BY-SA-3.0

**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

**DIA REGNO**
**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

# Enhavo

| | |
|---|---|
| Dek helpoj — pri la Dekalogo | 27 |
| Ekumena Diservo dum la Kristana Kongreso | 30 |
| Dio plejpotenca | 37 |
| Helpo al fuĝintoj organizita en Poděbrady | 38 |
| Katedralo Sankta Sofia en Kievo | 39 |
| Bone malbela | 40 |
| Aliĝantoj al la 71a kongreso de KELI | 41 |
| Internacia virina preĝotago | 42 |
| Kiam la nazioj forportis ... | 44 |
| Mimi Reinhardt – kaj la Schindler listo | 46 |
| Informetoj | 47 |
| Krist' Jesuo al ni naskiĝis | 48 |

## Redaktoraj vortoj

Kara leganto, la printempo ne alportis la kutiman sopiratan varmiĝon kaj "heliĝon" – pli helaj tagoj.

Kontraŭe, la malheliĝo, en formo de milito en Ukrainio, frapis nin. Jam pasis 2 monatoj kaj homoj perdas sian vivon, devas fuĝi, perdas siajn hejmojn k.t.p.

Plurloke, ni, en niaj sekuraj hejmlandoj, spertas la alvenon de fuĝintoj kiuj bezonas helpon diversmanieran. En la revuo sur paĝo 38 vi povas legi kion oni i.a. faris en Poděbrady por helpi ilin.

Kiam mi pensas pri la soleca kontraŭstaro de Ukrainio por sia propra elektita demokratio, mi pensas pri la "poemo" de Martin Niemöller (p. 44) kaj mi timas ke ni estas tro spektantaj kaj tro silentaj kaj pensas pri nia propra "bonfarto", nia monujo. Kiel ni komparu nian "koston" kompare al la kostoj de la ukrainoj?

Ĉu ni povas esperi pri baldaŭa fino?

# Dek helpoj — pri la Dekalogo

## Unua ordono — Vi havu Dion!

József Farkas, hungara reformita pastoro

Serio de pritraktoj en Legnica de Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU

> Mi estas la Eternulo, via Dio, kiu elkondukis vin el la lando Egipta, el la domo de sklaveco. Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi. (Eliro, 20, 2-3)

Jam dum trimil jaroj la elektita popolo de Dio konas la Dekalogon.

Dum tiu longa tempo judoj kaj kristanoj same klarigis kaj instruis la dekalogon: el la direkto de Dio ili alproksimiĝis al la temo, proksimume tiele: Dio estas en la ĉielo. Homo atentu, ne estas pluraj dioj, nur unu ekzistas, sed Li estas forta kaj potenca kaj kolerema Dio. Do atentu homo, ke vi estu en harmonio kun tiu Dio, iel atingu la amon de Dio, kaptu kaj tenu la amon de Dio. Tiu ĉi forta, ununura, granda Dio esprimis sian volon. Homo, agu bone, alie li terure punos vin.

Jarmiloj pasis en tiu ĉi etoso, kaj la metodo funkciis dum longega tempo, sed mi certas, ke hodiaŭ jam ne funkcias.

Aperis al mi la vorto de la Eternulo, dirante: Antaŭ ol Mi formis vin en la utero, Mi vin konis, kaj antaŭ ol vi eliris el la ventro, Mi vin sanktigis, Mi faris vin profeto por la popoloj. Mi diris: Ho ve, Sinjoro, ho Eternulo! mi ne povoscias paroli, ĉar mi estas juna. Sed la Eternulo diris al mi: Ne diru, ke vi estas juna; sed ĉien, kien Mi sendos vin, iru, kaj ĉion, kion Mi ordonos al vi, parolu. Ne timu ilin; ĉar Mi estas kun vi, por savi vin, diras la Eternulo. Kaj la Eternulo etendis Sian manon kaj ektuŝis mian buŝon, kaj la Eternulo diris al mi: Jen Mi enmetis Miajn vortojn en vian buŝon. Vidu, Mi starigas vin hodiaŭ super la popoloj kaj super la regnoj, por elŝiri, rompi, pereigi, kaj detrui, por konstrui kaj planti.

Kaj Mi eldiros Mian verdikton pri ili pro ĉiuj iliaj malbonagoj, pro tio, ke ili forlasis Min kaj incensis al aliaj dioj kaj adorkliniĝis antaŭ la faritaĵo de siaj manoj. Kaj vi zonu viajn lumbojn, leviĝu, kaj diru al ili ĉion, kion Mi ordonas al vi; ne tremu antaŭ ili, por ke Mi ne tremigu vin antaŭ ili. Jen Mi faras vin hodiaŭ fortikigita urbo, fera kolono, kaj kupraj muroj en la tuta lando, kontraŭ la reĝoj de Judujo, kontraŭ ĝiaj princoj, kontraŭ ĝiaj pastroj, kaj kontraŭ la popolo de la lando. Ili batalos kontraŭ vi, sed ne venkos vin; ĉar Mi estas kun vi, diras la Eternulo, por savi vin. (Jeremia, 1:4-10 kaj 16-19)

Troviĝas pastoroj, kiuj daŭre parolas tiel, sed laŭ mi tiu ĉi parolo atingas hodiaŭ surdajn orelojn.

Eblas alimaniere, el la direkto de la homo alproksimiĝi al la dekalogo. Mi pensas, ke mem la dekalogo permesas tion. Mi akcentas nur tiun simplan esprimon: *Mi, la Eternulo estas via Dio*. Tio temas pri vi, homo! Mi estas *via* Dio.

Eblus kontraŭe: Vi, Izrealo, ne forgesu, vi estas mia popolo, mia havaĵo, vi estas en sklava kontakto kun mi.

Dio ne tion diras, ne pri tio volas ke ni memoru, sed kontraŭe: *Vi* havas Dion. Mi, Dio estas *via* Dio.

Mi nun praktikas tiun ĉi vidpunkton. Se ni el la direkto de la homa vivo pensadas pri la dekalogo, tiam tiel ni povas "traduki" la unuan ordonon: Se vi vere volas fariĝi homo, necesas, ke *vi havu Dion*. Ĉar *nur en la proksimeco de Dio la homo fariĝas homo*. La unua ordono havas tiun pozitivan enhavon, kio estas interesa ankaŭ al la moderna homo. Vi certe ŝatus esti homo en la plena signifo de la vorto homo! Do vi bezonas havi Dion, vi devas esti en la proksimeco de Li, vi devas esti en kontakto kun Li, esti en interparolo kun Li, moderne: en responso vi fariĝos vere homo.

Estas malfacila vojo. Estas komprenebla, ke la plejmulto de la homoj ne akceptas tiun vojon kaj – forlasante la unuanuran vivantan, veran Dion – iras al fremdaj dioj, kaj homo fariĝas sklavo de aliaj dioj. Kaj elformiĝas la moderna vivo: estas tiu, kiu volas aŭton, la alia volas pli da aplaŭdo, amo, alkoholo. *Ian* dion ĉiuj havas, ankaŭ tiu, kiu ne havas la unuanuran, vivantan, veran Dion.

Homo provas pli malmultekoste solvi sian vivon. Anstataŭ la vera Dio, kiu volas sur laciga kaj malfacila vojo nobeligi la homon, homo elektas pli malmultekostajn, pli agrablajn, pli facilajn diojn.

Ni pensu pri tio, kio okazis kun Jeremia! Dio vokis lin, donis al li taskon, vidkapablon. Kiam li ektimiĝis, Dio diris al li: ne timu, ĉar Mi estas kun vi. Tiuj kelkaj vortoj, "mi estas kun vi" estas la sekreto de homa vivo, la profeta sorto.

Ĉar pli-malpli ni ĉiuj havas profetan mision, laŭ simpla signifo de la vorto, ke dum la vivo de la homo pli-malpli frue aŭ malfrue ni ĉiuj havas iun vizion: tio estos mia misio. Mi estos instruisto, mi estos doktoro, mi estos pastoro, mi estos farmisto, ktp. Kaj kiam mi vidas ĉirkaŭ mi mem la malhonestajn instruistojn, doktorojn, tiam venas la terura demando, kial mi estu alia, kial mi estu honesta? En tiu ĉi momento malkovriĝas, ĉu mi estos homo?

En la vivo de ni ĉiuj ni havas la ordonon: vi estu diferenca ol la aliaj homoj. Tiun ĉi diferencon eblas montri en la kuirejo, en la oficejo, en la metiejo aŭ sur la predikejo. Kaj ni ĉiuj havas tiun ĉi mision: tie, kie vi estas, vi estu diferenca ol la homamaso. Tio ne estas facila, ĉar la grego ne eltenas, ke iu estu diferenca kaj ĝi piedpremas la aliulon. Tie ĉi estas la sekreto fariĝi homo: ĉu la homo povas esti alia? La lukton fariĝi homo nur tiel eblas elteni, se la homo *havas* Dion.

"… ne tremu antaŭ ili, por ke Mi ne tremigu vin antaŭ ili." – ni legis ĉe Jeremia. Se vi, homo perdos min, tiam ĉio tremigos vin.

Tiel ni legas en la unua ordono "Mi estas la Eternulo, via Dio… Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi."

Jen, tiel mi diras pozitive tion: Homo, via misio estas fariĝi homo. Sed plenigi tiun mision estas malfacila tasko kaj vi bezonas Min. Sen Mi vi ne sukcesos, ĉar fariĝi homo signifas ke vi vere vidas, kaj vi persistas, kaj vi de supro ricevas forton, kaj inter la amaso de falsaj dioj kaj profetoj vi iras rekten sur la vojo, kiun Dio donis al vi.

Kiu faras tion, tiu estas vere homo. La aliaj estas nur grego.

Ni staras antaŭ Dio kaj ni uzas la mezurilon de Dio.

"Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi."

Ne tiel okazas, ke homo forlasas sian veran, unununuran Dion kaj elektas alian, fremdan dion al si mem. Tiel okazas, ke se homo elfaliĝas el la amo de la vera kaj unununura Dio, tiam estos viktimo de aliaj dioj, estos sub la potenco de aliaj dioj. Estos viktimo de alkoholo, ĉar alkohol-dio donas iom da konsolo. Aŭ estos viktimo de seksumado, ĉar seksumad-dio stimulas la nervojn kaj donas iun viv-similaĵon.

Kiu perdas la unununuran, veran Dion, estos sub la potenco de fremda dio, mono, potenco, kaj la fremda dio sorĉas la homon kaj li ne povas fariĝi vera homo, ne povas burĝoni, plenigi sian homecon.

"Mi estas la Eternulo, via Dio… Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi."

Ni komprenu laŭ moderna pens-maniero! Tio ne temas pri tio, ke vi iru pli diligente al la preĝejo, alie Dio punos vin – tio estus vere primitiva pens-maniero.

Tio signifas, ke: homo, se vi volas esti homo en tiu ĉi nehumana mondo, se vi volas esti iom alia ol la amaso, tiam vi bezonas Dion, ĉar se Dio ne tenas vin, tiam ankaŭ vi fariĝos nehumane. En la oficejo, en la familiaj aferoj, en la rilato kun la mondo ne eblas sen Dio esti homo.

La tenanta mano de Dio aperas en la Biblio tiel: Jesuo Kristo.

Jesuo Kristo estas la helpanta mano de Dio, per kiu Li proksimiĝas al vi. En Jesuo Kristo estas la helpo de Dio. Tra Jesuo Kristo eblas fariĝi homo. Li estas La Homo, kiel per mirakla profeta bildo mem Pilato diris, sciante kaj komprenante nenion: "*Ecce homo!*"

En la sekvaj kvar paŝoj helpas vin Jesuo Kristo fariĝi homo:

Unue: En Jesuo Kristo, en Lia proksimeco, en Lia pureco eblas ekkompreni vian mision, vian taskon, kiun vi devas fari. Instrui, busŝofori, esti doktoro, kaj tiel plu.

Due: En Kristo vi ricevos forton plenumi, fari viajn taskojn, vian mision. Al ĉio mi havas forton, mi ĉion povas fari en tiu, kiu min fortikigas.

Trie: Kaj kiam vi ne sukcesis esti homo – ĉar ni devas honeste diri, ke denove kaj denove ni ne sukcesas – tiam Dio en Kristo donas al vi konsolon, forton, saĝecon kaj indulgon.

Kvare: Kaj fine en Kristo Dio donas al vi esperon. Nun vi ne sukcesis, sed sukcesos. En Jesuo Kristo vi restu kun Dio kaj ne elektu aliajn diojn, ĉar ili sklavigos vin, pereigos vin. Nur en Lia proksimeco vi povos fariĝi vere homo.

# Ekumena Diservo dum la Kristana Kongreso

en Legnica, Pollando, 70a de KELI, 8an de aŭgusto 2021

Gvidis Philippe COUSSON, FR kaj pastro Roman Gmyrek, PL

## *Ordo de Diservo*

**(Dikaj literoj : ĉiuj)**

*Alvoko*

Graco kaj paco estas donitaj al ni de Dio, nia Patro, kaj de Jesuo Kristo, nia Sinjoro kaj de la Sankta Spirito.

Bonvenon al ĉiuj el vi en ĉi tiu ekumena Diservo.

Ni troviĝas ĉi tie hodiaŭ matene en komuneco kun la tuta kreitaro, potenca kaj delikata naturo, fruktodona kaj benita.

Dio, kreinto kaj akompananto de niaj vivoj kaj nia mondo, atendas nin kaj bonvenigas nin.

Ĉi tie ni estas invititaj laŭdi kaj preĝi por la tuta Kreitaro, ĉi tiun mondon ĉirkaŭ ni, en ni, kaj pri kiu ni foje scias tiel malmulte.

Ni estas invititaj al aŭskultado kaj kunestado, infanoj de la sama Patro, ni estas unuigitaj unu al la alia kaj al la mondo por ĉiam sub lia suno.

Ni danku Dion pro la kreo, kiun li konfidis al ni.

**Ni benu la Sinjoron!**

Ni ĝoju pri ĉi tiu donaco kaj pri la fido, kiun Dio metis en nin.

**Ni benu la Sinjoron!**

Pripensu kaj miru pri la diverseco kaj riĉeco de kreado

**Ni benu la Sinjoron!**

Dio kreinto, sendu vian Sanktan Spiriton sur nin; igu la ricevitajn donacojn frukti por la bono de ĉiuj.

**Venu Spirito de la Sinjoro.**

Dio de justeco kaj paco, sendu vian Sanktan Spiriton sur nin; zorgigu nin pri estontaj generacioj.

**Venu Spirito de la Sinjoro.**

Dio de Jesuo Kristo, sendu vian Sanktan Spiriton sur nin; akompanu nin sur niaj vojoj de konvertiĝo.

**Venu Spirito de la Sinjoro.**

**Amen**

*Legaĵo en Esperanto kaj kelkaj aliaj lingvoj la versiklon Miĥa 6:8*

*epo* : Estas dirite al vi, ho homo, kio estas bona kaj kion la Eternulo postulas de vi: nur agi juste, ami bonfarojn, kaj esti modesta antaŭ via Dio.

*sve* : Han har sagt dig, du människa, vad som är gott. Vad begär Herren av dig annat än att du gör det rätta, älskar barmhärtighet och vandrar i ödmjukhet med din Gud?

*hun* : Megjelentette néked, oh ember, mi légyen a jó, és mit kíván az Úr te tőled! Csak azt, hogy igazságot cselekedjél, szeressed az irgalmasságot, és hogy alázatosan járj a te Isteneddel.

*ĉeĥ* : Oznámil ti, člověče, co je dobré a co od tebe žádá Hospodin: Abys jednal spravedlivě, miloval milosrdenství a kráčel se svým Bohem v pokoře.

*fra* : On t'a fait connaître, homme, ce qui est bien et ce que l'Éternel demande de toi: c'est que tu mettes en pratique

le droit, que tu aimes la bonté et que tu marches humblement avec ton Dieu.

*pol* : Powiedziano ci, człowieku, co jest dobrem i czego WIEKUISTY od ciebie żąda. Przecież tylko, byś pełnił sąd, świadczył miłość oraz chodził w pokorze przed swoim Bogiem.

*Simbola gesto (alportado de elementoj el la naturo kaj la homa laboro)*

Naturaj rimedoj ne estas neelĉerpeblaj, nia mondo estas limigita, kaj ni devas lerni dividi niajn rimedojn kaj protekti nian medion. Diversaj objektoj memorigos nin pri la diverseco de naturaj rimedoj asociitaj kun la homa genio, kiu transformas ilin kaj kreskigas ilin. Per ĉi tiu procesio de kreosignoj ni dankas Dion.

*Laŭdo dum la procesia alporto de la objektoj. Ĉantado de Psalmo 104 (Adoru 062.3 kaj 062.4)*

Elsendu Vian Spiriton, kaj iĝos nova la vizaĝo de la Tero.

**Elsendu Vian Spiriton, kaj iĝos nova la vizaĝo de la Tero.**

1 Benu, ho mia animo, la Eternulon. /
Ho Eternulo, mia Dio, Vi estas tre
granda, * De majesto kaj beleco Vi
estas vestita;

2 **Vi, kiu estas ĉirkaŭkovrita de
lumo kiel de vesto, * Kiu sternas
la ĉielon kiel tapiŝon;**

3 Kiu aranĝas sur la akvo Siajn
ĉambrojn, / Kiu faras la nubojn Lia
veturilo; * Kiu iras sur la flugiloj de la
vento;

**4 Kiu faras la ventojn Liaj
senditoj, * Flamantan fajron Liaj
servantoj;**

5 Kiu fondis la teron sur ĝiaj funda-
mentoj, * Ke ĝi neniam ŝanceliĝos.

**6 La abismon Vi kovris kiel per
vesto, * Sur la montoj staras akvo;**

7 De Via minaco ĝi kuras, * De la voĉo
de Via tondro ĝi forrapidas.

**8 Ĝi leviĝas sur montojn, mal-
leviĝas sur valojn, * Al tiu loko,
kiun Vi destinis por ĝi.**

9 Vi faris limon, kiun ĝi ne superpaŝos,
* Por ke ĝi ne revenu por kovri la teron.

**10 Vi sendas fontojn al la riveroj, *
Kiuj iras inter montoj;**

11 Ili trinkigas ĉiujn kampajn bestojn; *
Sovaĝaj azenoj kvietigas sian soifon.

**12 Apud ili loĝas la birdoj ĉielaj, *
El inter la branĉoj ili sonigas sian
voĉon.**

13 Vi trinkigas la montojn el Viaj
ĉambroj; * Per la produktoj de Viaj
faroj satiĝas la tero. –

**14 Vi kreskigas herbon por la
bruto, / Kaj verdaĵon, kiu servas**



Philippe Cousson, kaj pastro Roman Gmyrek
kaj la alportitaj objektoj sur la tablo

**al la homo, * Por elirigi panon el la tero.**
15 Kaj la vino gajigas la koron de la homo, / La vizaĝo brilas de oleo, * Kaj la pano fortikigas la koron de la homo.
**16 Satiĝas la arboj de la Eternulo, * La cedroj de Lebanon, kiujn Li plantis;**
17 Kaj tie nestas birdoj; * Cikonio havas sian loĝejon sur abioj;
**18 La altaj montoj estas por la ibeksoj, * La rokoj estas rifuĝejo por la hirakoj. –**
19 Li aranĝis la lunon laŭ la partoj de tempo; * La suno scias sian subiron.
**20 Vi sendas mallumon, kaj fariĝas nokto, *Dum kiu vagas ĉiuj arbaraj bestoj;**
21 La leonidoj krias pri rabakiro, *Por peti de Dio sian manĝaĵon.
**22 Kiam leviĝas la suno, * Ili sin kaŝas kaj kuŝiĝas en siaj loĝejoj.**
23 Eliras homo por sia okupiĝo, * Por sia laboro ĝis la vespero. –
**24 Kiel multaj estas Viaj faroj, ho Eternulo! / Ĉion Vi faris kun saĝo; * La tero estas plena de Viaj faritaĵoj.**
25 Jen la maro, granda kaj vasta: / Tie estas rampaĵoj sennombraj, * Bestoj malgrandaj kaj grandaj;
**26 Tie iras ŝipoj; / Tie estas la levjatano, * kiun Vi kreis, ke ĝi tie ludu. –**
27 Ĉiuj ili atendas de Vi, * Ke Vi donu al ili manĝon en ĝia tempo.
**28 Vi donas al ili, ili kolektas; / Vi malfermas Vian manon, * kaj ili satiĝas de bonaĵo.**
29 Vi kaŝas Vian vizaĝon, tiam ili ektimas; / Vi forprenas ilian spiriton, * Tiam ili mortas kaj revenas al sia polvo.
**30 Vi sendas Vian spiriton, / tiam ili kreiĝas; * Kaj Vi renovigas la vizaĝon de la tero. –**
31 Gloro al la Eternulo estu eterne; * La Eternulo ĝoju pri Siaj faritaĵoj.
**32 Li ekrigardas la teron, kaj ĝi tremas; * Li ektuŝas la montojn, kaj ili fumiĝas.**
33 Mi kantados al la Eternulo, dum mi vivos; * Mi muzikados al mia Dio, dum mi estos.
**34 Agrabla estu al Li mia meditado; * Mi ĝojos pri la Eternulo.**
35 Malaperu pekuloj de sur la tero, / Kaj malvirtuloj ne plu ekzistu. * Benu, ho mia animo, la Eternulon. Haleluja!
**Elsendu Vian Spiriton, kaj iĝos nova la vizaĝo de la Tero.**

Per sia genieco kaj saĝo, la homoj transformas sian ĉirkaŭaĵon kaj uzas tion, kion la tero donas por vesti sin, nutri sin kaj esprimi sin. Ni konscias, ke kreado estas donaco konfidita al ni kaj ke ni respondecas pri la tuta loĝata tero, la oikumene, al estontaj generacioj.

*Pekkonfeso*

Ni estu atentaj – tiel diras la Sinjoro:

"Mi estas la Eternulo, via Dio, Kreinto de ĉielo kaj tero. Mi formis la teron kaj ĝian enhavon; Mi disvolvis la ĉielon kaj fiksis la stelojn; kampoj kaj arbaroj, birdoj kaj aroj.

Ĉio ĉi estas mia, la Universo estas mia, kaj mi estas tiu, kiu lokigis vin en ĝin.

Mia tuta kreaĵo estas por vi, ekposedu ĝin; Konservu ĝin tiel, ke ĝi permesu al vi vivi.”

Sinjoro, ĉiu ĉi tiu naturo, kiu ĉirkaŭas nin, estas via forto kaj via mistero: steloj de la firmamento kaj eroj de polvo, renaskiĝo de fontoj kaj vojoj de birdoj.

Sinjoro, la tuta kreaĵo, kiun vi ofertas al ni, estas via potenco kaj via amo: akvoj, montoj kaj valoj en via manplato, foliaro kaj lumo en la klareco de via rigardo, sennombra diverseco de specioj kaj vivaĵoj.

Sinjoro, vi invitas nin legi vian alvokon kaj vian atendon en la mondo. Ni estas nur eta parto de ĝi. Kiam ni forgesis ĝin? Pardonu nin kiam ni detruas kaj ekstermas anstataŭ esti la gardantoj de la benita abundo de via ĝardeno. Donu al ni ankri nin al ĝi, kaj reankrigi nin per saĝo kaj atentemo. Ankoraŭ restas tempo: konservi la aliulojn kaj nian mondon kaj prizorgi la estantecon kaj la estontecon en la kompleksa teksaĵo de ĉi tiu vivo, kiun vi amas kaj volis.

**Amen.**

*Himno Adoru 615*

*Proklamo de graco*

Ni estu atentaj – tiele diras la Sinjoro: “Mi estas la Sinjoro Jesuo Kristo, kiu por vi fariĝis homo. Estas mi, kiu resanigas vin de ĉiuj maltrankviloj; Mi, kiu redonas al vi vidi la birdojn de la ĉielo kiel la liliojn de la kampoj, Mi, kiu rediras al vi la gracon de Dio; Mi, kiu alvokas vin serĉi lian regadon kaj justecon. Por vi mi donis ĉion por fariĝi via frato.”

Sinjoro, benata vi estu pro via pacienco kaj via fido. En via graco vi levas nin el niaj egoismoj kaj niaj avidecoj. En via graco vi donas al ni vidi la belon, la bonon kaj la justecon kaj diveni la Regnon. Via amo certigu nin, gvidu nin kaj voku nin.

*Iluminado*

Ni estu atentaj, tiele diras la Sinjoro: “Mi estas la Sinjoro, la Sankta Spirito, kiu gardas la kreon.” Ni estu atentaj, tiam kiam ni malfermas la Libron de Vivo, ĉi tiun libron, kiu akompanas nin en niaj demandadoj:

Kiu mezuris la volumenon de la maro per la manplato?

Kiu juĝis la diametron de la ĉielo per siaj etenditaj fingroj? Kaj la polvo de la tero, kiu taksis ĝian mason enpakante ĝin en sitelo?

Kiu pesis la montojn, la montetojn sur la pesilo? Antaŭ ĉi tiu granda mistero, ni estas nur grandaj kiel formikoj.

La sorto de la homoj estas malfirma kiel tiu de herbo. Ni ne havas pli da forto ol la kampaj floroj. Sed vi, vi scias, vi, vi konas, via Vorto kreis la Teron de ekstremaĵo al ekstremaĵo.

Vi neniam hezitas, neniam laciĝas. Via inteligento estas nesondebla. Vi similas al paŝtisto, kiu kondukas sian ŝafaron kaj kolektas ilin per svingo de la brako; Vi portas la ŝafidojn kontraŭ vi, kaj vi domaĝas la ŝafojn, kiuj mamnutras idojn.

Ni fidas je via Spirito por renovigi niajn fortojn. Kiel agloj ni ekŝvebos. Ĉar vi vigligas tiujn, kiuj ne povas plu.

Jes, la herbo sekiĝas, la floro velkas, sed via Vorto restos eterne.

**Amen.**

*Legado de la Bibliaj tekstoj (Kol 1:15-20) kaj Mar 4:30-32*

*Himno Adoru 613*
*Medito*
La himno al Kristo el la letero al la Koloseanoj invitas nin laŭdi la savon de Dio, kiu ampleksas la tutan universon. Per Kristo, krucumita kaj resurektinta, vojo de repaciĝo malfermiĝis ankaŭ la kreitaĵo estas destinita por estonteco de vivo kaj paco.

Kun la okuloj de la fido ni vidas ke la Dia regno estas realeco tre proksima al ni, sed tamen, ankoraŭ eta, preskaŭ nevidebla, kiel senapa semeto. Tamen, ĝi konstante kreskis. Eĉ en la aflikto de nia mondo, la Spirito de la Resurektinta agadas. Li kuraĝigas nin partopreni, kun ĉiuj bonvolaj homoj, en la senlaca serĉado de justeco kaj paco, por ke la Tero denove fariĝu hejmo por ĉiu kreitaĵo. Ni partoprenas en la agado de la Spirito, tiel ke la kreitaĵo en ĉiu sia pleneco, daŭre laŭdu Dion. Kiam la naturo suferas, kiam homoj estas disbatitaj, la Spirito de Kristo resurektinta tute ne permesas al ni malkuraĝiĝi. Male, Li invitas nin partopreni en Lia resaniga ago.

La vivnoveco kiun Kristo alportas, eĉ se kaŝita, estas lumo de espero por multaj. Ĝi estas fonto de repacigo por la tuta kreitaĵo kaj enhavas ĝojon kiu venas de preter ni. “Por ke mia ĝojo en Vi restadu, kaj Via ĝojo estu plena.” (Joh 15:11)

Ĉu vi volas celebri la vivnovecon, kiun Kristo donas pere de la Sankta Spirito kaj fari, ke ĝi vivu en vi mem, inter ni, en la Eklezio, en la mondo kaj en la tuta kreitaĵo?

*Himno Adoru 618*
*Psalmo 8 legata (kiel kredkonfeso)*
*Himno Adoru 455*

*Porpeta preĝo*
Dio de kreado kaj vivo, Ni volas diri dankon pro la elekto, kiun vi donis al ni

Psalmo 8
2 Ho Eternulo, nia Sinjoro, Kiel majesta estas Via nomo sur la tuta tero! – Vi levis Vian gloron super la ĉielon. 3 Per la buŝo de junaj infanoj kaj suĉinfanoj Vi fondis al Vi potencon kontraŭ Viaj malamikoj, Por kvietigi la malamikon kaj la venĝemulon. – 4 Kiam mi rigardas Vian ĉielon, la faron de Viaj fingroj, La lunon kaj la stelojn, kiujn Vi estigis: 5 Kio estas homo, ke Vi lin memoras? Kio estas homido, ke Vi pensas pri li? 6 Vi malaltigis lin malmulte antaŭ Dio; Per honoro kaj beleco Vi lin kronis. 7 Vi faris lin reganto super la faritaĵoj de Viaj manoj; Ĉion Vi metis sub liajn piedojn: 8 Ŝafojn kaj bovojn ĉiujn Kaj ankaŭ la sovaĝajn bestojn, 9 La birdojn de la ĉielo kaj la fiŝojn de la maro, Ĉion, kio iras la vojojn de la maroj. – 10 Ho Eternulo, nia Sinjoro, Kiel majesta estas Via nomo sur la tuta tero!

inter vivo kaj beno, morto kaj malbeno. Senĉese vi invitas nin elekti vivon, por ke ni vivu, ni kaj niaj infanoj kaj la infanoj de niaj infanoj.

Vi memorigas nin, ke ankoraŭ eblas elekti la vivon, sekvante vian grandan ordonon pri amo, elekti la vivon kaj meti nian tutan energion en ĝin, ĉi tiun vivon endanĝerigitan de niaj elektoj de morto kaj malbeno.

**Sinjoro, elaŭdu nin.**

Hodiaŭ ni volas preĝi al vi por via kreitaro, el kiu ni estas parto kaj sen kiu ni ne povas vivi. Fronte al ĝiaj nekredeblaj diverseco kaj riĉeco, ĝia miriga ekvilibro kaj granda beleco, helpu nin preni niajn respondecojn ŝanĝi nian vivmodelon, por trovi nian ĝustan lokon inter ĉiuj vivantaj estaĵoj kiel humilaj kaj respektemaj gardistoj.

**Sinjoro, elaŭdu nin.**

Ni preĝas por la vivo de viaj plantoj kaj iliaj semoj, limigitaj al monokulturoj elĉerpantaj la teron, malfekundigitaj de kemio. Ĉi tiuj plantoj estas tro ofte traktataj kiel fiherboj, forigitaj de pesticidoj. Flaŭro kaj arbaroj hakitaj laŭ la ritmo de niaj ekonomiaj interesoj, kunportantaj kun ili la sekretojn de la vivo.

**Sinjoro, elaŭdu nin.**

Ni preĝas por la plej malgrandaj el viaj estaĵoj, kiujn ni ne povas vidi, sed kiuj per sia subtera laboro vivigas la teron Por la abelo, ĉi tiu granda sinjorino, kiu per sia senĉesa laboro permesas al plantoj kaj arboj porti fruktojn kaj legomojn, por por ĉiuj viaj insektoj, flugantaj, ne flugantaj, rampantaj kaj ĉiuj tiuj diskretaj kaj sekretaj organismoj, kiujn ni minacas.

**Sinjoro, elaŭdu nin.**

Ni preĝas por la milionoj da viaj specioj, kiuj svarmas en la freŝaj kaj salaj akvoj, por la rano kaj la bufo, la angilo kaj la sturgo, la ruĝeta tinuso, la meruo kaj la merluĉo, la koralo kaj la meduzo, la porknaza testudo kaj la delfeno de Irrawaddy, de planktono ĝis balenoj por ĉi tiu tuta vivmedio, minacata de trofiŝkaptado, poluado kaj klimata ŝanĝo.

**Sinjoro, elaŭdu nin.**

Ni preĝas por viaj birdoj, por la alaŭdo, la perdriko kaj la pirolo, la urio, la fraterkulo kaj la pingveno ... La monarka papilio, la atalanto kaj la kardo-papilio ... perditaj en la pejzaĝoj ŝanĝitaj de la homo priserĉantaj sian manĝaĵon, trankvilajn lokojn por fari siajn nestojn, spacojn por halti dum siaj vojaĝoj.

**Sinjoro, elaŭdu nin.**

Ni preĝas por viaj grandaj sovaĝaj bestoj, kiuj plenigis nian imagon de kiam ni lernis marŝi: la azia elefanto kaj la bengala tigro, la rinocero kaj la gorilo, la blanka urso kaj la griza lupo ... kiuj baldaŭ ekzistos nur en niaj fabeloj.

**Sinjoro, elaŭdu nin.**

Ni preĝas por viaj bestoj, tiujn, kiujn ni enmetis en kaĝojn. Por kokinoj, bovinoj kaj porkoj, mistraktataj, ekspluatataj, enfermitaj en sistemo, kiu faris el bredado industrion.

**Sinjoro, elaŭdu nin.**

Dio de kreado kaj vivo, jen ni antaŭ la vivo kaj ĝia feliĉo kaj la morto kaj ĝia malfeliĉo. Vi memorigas nin, ke en la mallonga tempo, kiu restas al ni, eblas ankoraŭ elekti la vivon kaj fariĝi beno anstataŭ ĉi tiu malbeno. Helpu nin riski ĉi tiun ŝancon, kiun vi donas al ni. Helpu

nin atingi la nivelon de nia homeco, de viroj kaj virinoj kreitaj laŭ via bildo, gardantoj de via ĝardeno.

**Sinjoro, elaŭdu nin.**

Ni preĝu kune laŭ la vortoj de ĉi tiu viro, kiu diris, kion vi faras al miaj etuloj, vi faras tion al mi.

Patro nia, kiu estas en la ĉielo,
sanktigata estu Via nomo,
venu Via regno, fariĝu Via volo,
kiel en la ĉielo,
tiel ankaŭ sur la tero.
Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ,
kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,
kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj,
kaj ne konduku nin en tenton,
sed liberigu nin de la malbono.
Ĉar Via estas la regno
kaj la potenco
kaj la gloro, eterne

**Amen.**

*Sendo, beno*

Benata estu la homo, kiu sin apogas sur la Sinjoro: la Sinjoro estos ĝia subteno. Li estos kiel la arbo plantita ĉe la akvo, kiu kreskas, al la fluo, ĝiaj radikoj. Li ne timas, kiam venas la varmego; ĝia foliaro restas verda. En la jaro de la sekeco, li ne havas zorgojn: li ne maltrafas ne doni fruktojn. (Jer 17, 7-8)

Ĉiopova kaj Kompatema Dio vi benas nin kaj nin gardas, la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito.

**Amen**

Fontoj :

Adoru.

Saison de la Création 2019, liturgie possible A

Culte pour le temps de la Création 2018, R. Wolff-Bonsirven, UEPAL

Célébration œcuménique lors de la COP21, CÉCEF

Libreto de la preĝo-semajno por la unueco de la kristanoj 2021, ikue.org




Fotis: Pascale Gaillard

# *Dio de vivo amo frateco*

**Dio plejpotenca,**
vi havas por la homaro planojn de paco.
Hodiaŭ militbruoj sonas ĉe la rando de Eŭropo.
Ni venas al vi, en nia malriĉeco de homoj,
por konfidi al vi ĉi tiun situacion.
**Dio de paco, aŭskultu nian preĝon.**

Dio de vivo,
vi formis ĉiun homon sur ĉi tiu tero.
Ni preĝas al vi por ni ĉiuj, civitanoj de Eŭropo,
speciale por la loĝantoj de Ukrainio kaj Rusio.
Ke ili povu kune dialogi
kaj kreski en ĉi tiu paco kiun vi ofertas al ni.
**Dio de paco, aŭskultu nian preĝon.**

Dio de amo,
vi relevas kaj plifortigas tiujn kiuj sin konfidas en vi.
Ni preĝas al vi por ĉiuj ŝanceliĝantoj
pro timo, angoro kaj perforto :
estu iliaj subteno kaj espero.
Dio de paco, aŭskultu nian preĝon.

**Dio favorkora,**
vi vokas al vi kaj la potenculojn kaj la humilulojn.
Ni preĝas al vi por la regantoj de ĉi tiuj militantaj landoj
kaj de ĉiuj landoj : venu kaj rompu la orgojlon de la potenculoj
kaj donu al ili la spiriton de saĝeco kaj servado.
**Dio de paco, aŭskultu nian preĝon.**

Dio de frateco,
vi vokas nin al kuna kreskado preter niaj diferencaj religioj.
Ni preĝas al vi por ni ĉiuj, kredantoj el diversaj tradicioj.
Konvertu niajn korojn per la paco kiun vi ofertas al ni,
kaj helpu al ni atesti pri ĝi ĉiutage.
**Dio de paco, aŭskultu nian preĝon.**

El la franca tradukis Philippe Cousson

# Helpo al fuĝintoj organizita en Poděbrady

Raportis Pavel POLNICKÝ, CZ











Estimataj,

nia paroĥejo fariĝis centro, kien povas loĝantoj de nia urbo Poděbrady transdoni necesajn aĵojn por fuĝintoj de Ukrainio. Dum 2 tagoj estis niaj ĉambroj plenaj.

Mi hieraŭ 3 horojn helpis kontroli, dividi kaj paki vestaĵojn por infanoj kaj jam vespere venis aŭtomobiloj, kiuj parton transportis al limo de Ukrainio.

Nia urbo preparis tiun loĝejon, kie kongresanoj loĝis en la jaro 2011, por loĝigi tie fuĝintojn.

Ni preĝu por la baldaŭa fino de tiu rusa militatako.

Amike
Pavel

# Katedralo Sankta Sofia en Kievo

## Monda heredaĵo de UNESKO

El Vikipedio

La Katedralo Sankta Sofia en Kievo (ukraine, Собор Святої Софії) estas elstara arkitektura monumento de la iama Kieva Regno. Hodiaŭ, ĝi estas unu el la plej konataj kaj vizitataj monumentoj de la urbo kaj la unua en la listo de la Monda heredaĵo de UNESKO de Ukrainio.

La nomo de la katedralo venas de la katedralo Hagia Sofia de la 6a jarcento en Konstantinopolo (kio signifas "Dia Saĝeco") kaj ĝi estas dediĉata al la Sankta Dia Saĝeco pli ol specifa sanktulino kun la nomo Sofia.

En la komenco, la katedralo ankaŭ funkciis kiel tombejo por la regantoj de la Kieva Regno.



La arkianĝelo Gabrielo anoncas la Bonan Novaĵon pri la naskiĝo de la Dia Infano, al Virgulino Maria. Estas surskribo en la greka apud la figuro: "Saluton, Virgulino plena de graco, la Sinjoro estas kun Vi". (Vikipedio/Publika havaĵo)

Post la Rusa Revolucio de 1917, kaj dum la soveta kontraŭreligia kampanjo de la 1920aj jaroj, la registaro petis la detruadon de la katedralo kaj la transformiĝon de la tereno en parko por la "Herooj de Perekop" (venko de la Ruĝa Armeo en la Rusa Enlanda Milito en Krimeo). La katedralo saviĝis de la detruado ĉefe pro la penado de multaj sciencistoj kaj historiistoj. Tamen, en 1934, la soveta registaro konfiskis la konstruaĵon, inkluzive la arkitekturan komplekson de la 17a–18a jarcentoj kiuj ĉirkaŭis ĝin, kaj fondis arkitekturan kaj historian muzeon.

Fine de la 1980aj jaroj, la sovetaj aŭtoritatoj, kaj poste la ukrainaj, promesis redoni la konstruaĵon al la Ortodoksa Eklezio. Pro diversaj skismoj la redonado prokrastiĝis ĉar ĉiuj ortodoksaj kaj grek-katolikaj eklezioj postulis ĝin.

La nuna komplekso funkcias kiel muzeo de la Kristanismo de Ukrainio.

La 27an de aŭgusto 2007, la Katedralo Sankta Sofia estis konsiderata kiel unu el la Sep Mirindaĵoj de Ukrainio, per balotadsistemo de fakuloj kaj la interreta komunumo.

En 2022 Rusio komencis militon kontraŭ Ukrainio kaj multaj kulturaĵoj kaj mondaj heredaĵoj riskas detruiĝon.

# Bone malbela

Mi estas tre malbela
Do ne provu konvinki min ke
Mi estas tre bela homo
Ĉar je la fino de la tago
Mi malamas min mem en ĉiaj manieroj
Kaj mi ne mensogos al mi mem dirante
Troviĝas beleco en mi, kiu gravas
Do estu certa, ke mi memorigos min mem
Ke mi estas senvalora, terura persono
Kaj nenio, kion ajn vi diras, igas min kredi
Mi ankoraŭ meritas amon
Ĉar ne gravas kio
Mi ne estas sufiĉe bona por esti amata
Kaj mi ne estas en situacio, ke mi kredu, ke
Beleco ekzistas en mi
Ĉar, kiam ajn mi rigardas en la spegulon, mi ĉiam pensas
Ĉu mi estas tiel malbela, kiel homoj diras?

Nun legu la poemon de sube supren!

Tradukis Ágnes Ráczkevy-Eötvös

# Pretty ugly

I'm very ugly
So don't try to convince me that
I am a very beautiful person
Because at the end of the day
I hate myself in every single way
And I'm not going to lie to myself by saying
There is beauty inside of me that matters
So rest assured I will remind myself
That I am a worthless, terrible person
And nothing you say will make me beleive
I still deserve love
Because no matter what
I am not good enough to be loved
And I am in no position to beleive that
Beauty does exist within me
Because whenever I look in the mirror I always think
Am I as ugly as people say?

Abdullah Shoaib

# Aliĝantoj al la 71a kongreso de KELI
# 16-23 julio 2022, en Domaszék, Hungario

*"Li faris nenian diferencon inter ni kaj ili"* (Agoj 15, 9)

Ankoraŭ estas lokoj en la bela ripozloko de hungara romkatolika eklezio, do ne hezitu aliĝi kaj veni al Hungario, kune preĝi, kanti, aŭskulti prelegojn kaj ekskursi kun aliaj kristanaj esperantistoj!

Ĉion bezonatan informon vi trovas en antaŭaj numeroj de Dia Regno, sur la ttt-paĝo de KELI kaj sur la facebook-paĝo de la kongreso ("Kristana Kongreso 2022")

Ĝis la 20a de aprilo aliĝis al nia ĉijara kunestado:

| | | |
|---|---|---|
| 1. | Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS | Hungario |
| 2. | Bengt Olof ÅRADSSON | Svedio |
| 3. | André ÅRADSSON | Hungario |
| 4. | Philippe COUSSON | Francio |
| 5. | Pavel POLNICKÝ | Ĉeĥio |
| 6. | Antal PESTI | Hungario |
| 7. | Pavol PETRIK | Slovakio |
| 8. | Jolanta KIERES | Pollando |
| 9. | Bozena KOCYK | Pollando |
| 10. | Marian KOCYK | Pollando |
| 11. | Ágota KIRSCH | Hungario |
| 12. | Veronika KIRSCH | Hungario |
| 13. | Gabriella STIER | Rumanio |
| 14. | Oldřich Arnost FISCHER | Ĉeĥio |
| 15. | Marek DABROWSKI | Pollando |
| 16. | Barbara LIPSKA | Pollando |
| 17. | Mária LÁSZLÓ | Hungario |
| 18. | Terézia Ildikó SCURT | Rumanio |
| 19. | Elzbieta KARCZEWSKA | Pollando |
| 20. | Helena BISKUP | Pollando |
| 21. | Janina BARONOWSKA | Pollando |
| 22. | Maria STAL-JASKIERSKA | Pollando |

# Internacia virina preĝotago

Marto 2022

Raportas Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU

Jam ekde 1870 estas organizitaj la virinaj mondaj preĝotagoj. En ĉiu jaro la komitato elektas landon, kies virinoj elektas la temon, kunmetas la liturgion kaj decidas pri la celo, kiun oni per mondonaco helpu.

La tekstojn oni tradukas al multaj lingvoj kaj en multaj landoj en la sama tago, komenco de marto, samtempe kaj same preĝas kristanoj – kompreneble ne nur virinoj.

Ĉijare la liturgion aranĝis virinoj de Anglio, Kimrujo kaj Norda Irlando, kaj la estraro de KELI decidis, ke ankaŭ ni, kristanaj esperantistoj, partoprenu en tiu ĉi bela tradicio.

Kun helpo de Pavol Petrik SK, Oldrich Fischer CZ, Bengt Olof Åradsson SE, Norbert Südland DE kaj Philippe Cousson FR ni tradukis la tekston, Albrecht Kronenberger helpis per la elektado de kantoj kaj amikoj instruis al mi la uzadon de aplikacio al retaj kunvenoj (nome Zoom, vidu bildojn).

Unue, en la 3a de marto vespere, ni kunvenis rete kaj preĝis kune. Poste venis petoj de tiuj, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne povis partopreni, ke ni ripetu la okazaĵon. Tion ni volonte faris. Tiel en la 11a de marto okazis dua kunveno.

Estis kortuŝite vidi longtempajn geamikojn kaj antaŭe nekonatajn novulojn el pli ol dek landoj kaj kune preĝi per la helpo de la moderna tekniko!

Ni decidis, ke ni klopodos ĉiujare organizi la internacian virinan preĝotagon esperantlingve!

## Partoj de la preĝo:

La temo de nia hodiaŭa servado estas tiu promeso de Dio, kiu troviĝas en la libro de Jeremia: “Ĉar (nur) Mi scias la intencojn, kiujn Mi havas koncerne vin.”

Ni rigardu – fokusite pri libereco, pardondono, justeco kaj paco de Dio –, kiel povas esti tiu ĉi promeso la signo de la espero al ĉiuj homoj.



– Ni preĝas por ĉiuj, kiuj estas malsataj, kiuj ne havas sufiĉe por digne vivi, ĉar ili suferas mankon. Kaŭze de siaj malespero, ili ofte uzas eksterkutimajn manierojn por savi sin kaj sian familion el sia malespera situacio. Ni preĝas: Vi akrigu nian ekvidon, donu al ni atentemajn okulojn, por ke ni eksciu, kie helpo estas bezonata, kaj kapabligu nin esti respondecaj, ke ĉi tiuj homoj trovu helpon kaj konsolon en niaj komunumoj.

*Nia kompatema Dio aŭskultu nian preĝon!*

– Ni preĝas por ĉiuj, kiuj estas mistraktataj, kiuj ne estas sekuraj ĉe siaj lernejoj aŭ laborlokoj, sed devas havi timon. Tro ofte homoj uzas fidorilaton por devigi malfortulojn, al siaj subuloj en perfortan dungorilaton. Ni preĝas, ke ili estu plifortigataj kaj liberigataj de tiuj, kiuj mistraktas ilin. Helpu nin pledi por iliaj rajtoj kuraĝe kaj insiste.

*Nia kompatema Dio aŭskultu nian preĝon!*

– Ni preĝas por ĉiuj, kiuj estas solecaj kaj ekskluditaj. Ni petas, ke ili spertu amikecon kaj komunecon. Bonvolu helpi ilin esti inkluzivitaj kaj scii, ke ili estas amataj de vi kaj ke vi havas bonajn planojn de espero por ili.

*Nia kompatema Dio aŭskultu nian preĝon!*

– Ni preĝas por ĉiuj, de kiuj ni deturnas nin. Ni faras tion ofte kaŭze de nescio aŭ nemotivita impulso. Donu al ni la kapablon dubi pri nia agadmaniero kritike, estigi emocian kompetentecon, kaj donu al ni la kuraĝon vivi inkluzive kaj konsekvence. Ni preĝas, ke ili trovu sian lokon ĉe ni kaj sentu sin esti amata kiel gefiloj de Dio.

*Nia kompatema Dio aŭskultu nian preĝon!*

– Ni preĝas por ĉiuj, kiuj dispeliĝis el siaj hejmlandoj, kiuj devas vivi en ekzilo kaj havi timon perdi ĉion, kio estas sperta al ili. Ili ne libervole venas al ni, sed fuĝas el vivosituacio netolerebla al ili. Ili ofte dum longa tempo timas pro ilia restadorajto kaj ne trovas ripozon. Dio, donu nin la forton etendi niajn brakojn, uzi niajn eblecojn por doni al ili ŝirmon. Tiel ili povas ekigi novan vivenergion. Ni preĝas, ke ili spertu la pacon de Dio kaj la forton de Dio dum sia vivo.

*Nia kompatema Dio aŭskultu nian preĝon!*

– Ni volas transdoni nin kaj ĉiujn homojn, por kiuj ni preĝas, al la zorgo kaj la protekto de Dio en la nomo de nia frato Jesuo Kristo, nia Savanto.

*Nia kompatema Dio aŭskultu nian preĝon!*



# *Kiam la nazioj forportis –*

Martin Niemöller

El Vikipedio

Martin Friedrich Gustav Emil NIEMÖLLER (14an de januaro 1892, Lippstadt, Germanio – 6an de marto 1984, Wiesbaden, Germanio) estis elstara germana antifaŝista teologo kaj pastro, fondinto de Konfesanta Eklezio, prezidanto de la Monda Konsilio de Eklezioj.

Li naskiĝis en pastra familio. Li servis en la unua mondmilito sur ŝipoj, eĉ iĝis komandanto de germana submarŝipo. Post la milito, li studis teologion en Münster. Li ekagadis kiel pastro en 1931 en Dahlem, ekstera urboparto de Berlino. Du jarojn poste — kiel protesto kontraŭ la nazia eklezia politiko — fondis la organizon *Pfarrernotbund* por helpi pastrojn. La grupo agadis sur diversaj terenoj kaj provis lukti kontraŭ la diskriminado de la jud-devenaj kristanoj.


Li partoprenis en fondo de la Konfesa Eklezio — ene de la evangelia eklezio — kaj gravis en formado de kontraŭstaro, ĉar la nazioj kreis la organizon Deutsche Christen (Germanaj Kristanoj), kiu volis subigi la germanajn ekleziojn. Oni oficiale deklaris la kontraŭstaron de la Konfesa Eklezio kaj konfirmis en koncilio de 1934, Barmen. Niemöller daŭrigis la mesadon dise en Germanio, ĝis arestis lin la Gestapo en 1937. Oni internigis lin en

Kiam la nazioj forportis la komunistojn, mi silentis; mi ja ne estis komunisto.

Kiam ili enkarcerigis la socialdemokratojn, mi silentis; mi ja ne estis socialdemokrato.

Kiam ili forportis la sindikatanojn, mi ne protestis; mi ja ne estis sindikatano.

Kiam ili forportis min, restis neniu plu, kiu povis protesti.



Sachsenhausen, poste en Dachau, en 1945 en Tirol, kie liberigis lin la aliancanoj.

Post la milito, li partoprenis en reorganizo de la evangelia eklezio kaj en 1945 gvidis la eksterajn rilatojn. Li iĝis en 1948 membro de la eklezia koncilio, de 1947 ĝis 1964 prezidanto de la eklezia distrikto Hessen-Nassau.

Ĉar li konvinkiĝis pri kolekta kulpeco de la germanoj, la germana evangelia eklezio en 1945 deklaris pri tio en la Stuttgarta kulpokonfeso — ĉefe danke al li. Oni elektis lin en 1961 al unu (el ses) prezidanto de la Monda Konsilio de Eklezioj. Li prezidantis ĝis 1968.

Li iĝis konvinkita pacifisto kaj agadis por la internacia paco kaj malarmado. Li veturis en 1952 al Moskvo, en 1967 al Nord-Vjetnamio.

Oni distingis lin en 1967 per Internacia Lenin-pacpremio, en 1971 per granda Federacia Meritkruco (Germanio).

E1 *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

**24. februaro** (la tago de la ekmilito)

*Kara Patro en la Ĉielo, ligu min per fortaj ligiloj al miaj gefratoj. Mi servu Viajn kreitaĵojn per vortoj, agoj kaj amaj kaj pacaj pensoj. Via granda familio vere estu harmonia.*




Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso en la kolofono). Tiel Vi subtenos la agadon "Stichting Zienderogen" iniciata de J. Tuinder.

# Mimi Reinhardt – kaj la Schindler listo

## El Vikipedio aranĝis kaj kunmetis Bengt Olof ÅRADSSON, SE

Mimi Reinhardt (antaŭe Weitmann), naskiĝis en 1915 en Vieno, mortis la 8an de aprilo 2022 en Israelo. Ŝi estis aŭstra sekretariino kaj laboris por la industriulo Oskar Schindler, kaj skribis la liston de judaj laboristoj, kiujn Oskar Schindler dungis al sia emajl- kaj municiofabriko en Krakovo.


Mimi Reinhardt studis lingvojn en la Universitato de Vieno, kie ŝi ankaŭ lernis stenografion, por preni notojn pli rapide. En Vieno ŝi renkontis sian estontan edzon, kaj post *Anschluss* translokiĝis kun li al Krakovo, Pollando. Ŝi kaj ŝia edzo estis arestitaj. Li estis pafita en la Krakova geto, kiam li provis eskapi. Post la fermo de la Krakova geto, ŝi estis transportita kun aliaj judoj al la koncentrejo Płaszów.

Ĉar ŝi scipovis stenografion, ŝi estis dungita de la tendara administracio, kie ŝi renkontis Oskar Schindler, kaj iĝis lia sekretario. Post kiam Schindler petis SS-kampadestron pli da laboristoj, ŝi komencis presi liston de laboristoj, kiu tiam povus esti transdonita al la subtendaro Brněnec [ge: Brünnlitz], kie Schindler daŭrigis siajn agadojn. Danke al lia helpo, 1200 judoj pluvivis tie ĝis la liberigo en majo 1945.

Post la milito, Mimi Weitmann trovis sian filon Sacha Weitmann en Hungario, kaj movis kun li al Tanĝero. Tie ŝi renkontiĝis kaj edziniĝis al sia dua edzo, sub la nomo Reinhardt.

En 1957, la familio translokiĝis al Usono kaj vivis en New York. En 2007, en la aĝo de 92, Mimi Reinhardt translokiĝis al sia filo en Israelo.

Ŝi mortis tie, 107 jarojn aĝa.



Oskar Schindler en Argentino post la dua mondmilito.



Interesaj faktoj: Oskar Schindler naskiĝis en Svitavy 1908 kaj li mortis en 1974 kaj estas entombigita en katolika tombejo sur la monto Cion en Jerusalemo. Li estas la nura membro de la nazia partio, kiu estas honorata tiamaniere. Pro siaj klopodoj dum la milito, Schindler estis deklarita en 1963 *Justulo inter popoloj*, premio donita de la ŝtato Israelo al ne-judoj kiuj ludis aktivan rolon en savado de judoj dum la holokaŭsto. Multajn judojn li ankaŭ translokigis al vilaĝo Brněnec (multaj detalaj informoj en la E-o muzeo en Svitavy).

# Informetoj

Miaj karaj gefratoj,



en aprilo nia kara amikino, *Irénke Bagi* festis sian 90-an naskiĝtagon. Mi vizitis ŝin kaj kun floroj gratulis al ŝi en la nomo de KELI.

Ŝi fartas bone, tute freŝe mense, do ni bone interparolis kaj rememoris pri antaŭaj KELI-anoj kaj kongresoj.

Ŝi multe dankis, ke ni pensis, pensas pri ŝi kaj elkore salutas vin ĉiujn!

Ágnes

---

Karaj geamikoj!

Kun granda bedaŭro mi informas vin, ke nia komuna amiko *Marian Łaba* el Koszalin mortis 09.02.2022 en help-domo por maljunuloj.

Je la 17.02.2022 en Koszalin okazis entombiga ceremonio.



Marian, Ceslavo, Rene, Verner, Renata

Lastatempe Marian vivis en domo por maljunuloj en vilaĝo Wiśnicze apud Gliwice. Mi kontaktiĝis kun li per-telefone. Mi eĉ kelkfoje proponis viziti lin en tiu domo. Li respondis al mi, ke li estas malforta, malsana, kaj kiam ĉio pliboniĝos li telefonos al mi kaj eventuale ni renkontiĝos. Dio decidis alie. Niaj planoj ne sukcesis.


Mi scias, ke koszalinaj esperantistoj partoprenis tiun ceremenion. Mi petis ke ili aĉetu nome de ni (ankaŭ Vi) bukedon de floroj kaj metu sur tombon.

Kun saluto
Stanislavo

# Krist' Jesuo al ni naskiĝis

## M: AL DIE WILLEN TE KAAP'REN VAREN

### KYRIE-Litanio (flandra)




KRIST' JESUO AL NI NASKIĜIS • KYRIE-Litanio • M (Al die willen te kaap'ren varen): flandra • E (originale verkita kiel kontrafakturo): Albrecht Kronenberger 2022-03-24